

juna. amiko

Numero 68
94/1

Internacia Kvaronjara Lernejana Revuo en Esperanto



Enketilo: Estu pli da kio?



ilei

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj



Certe vi longe serĉas vian unuan numeron de *Juna amiko* por 1994. Bedaŭrinde, dum longa tempo ni ne trovis tempon pretigi ĝin. Serĉu tra la revuo, kaj vi malkovros kion alian ni preparis anstataŭ *JA!* Ni fidas, ke vi ne perdis esperon – vidu, nun finfine vi ricevas la revuon.

Nia kovrilo anoncas nian ĉefan temon – kiel ni promesis – ni enketas. Ni demandas al vi, la legantoj, kion vi opinias pri la revuo, por ke ni preparu pli kontentigajn numerojn. Per la enketilo ni serĉas viajn opiniojn por malkovri komunajn dezirojn. Trovu la tempon plen-skribi la enketilon sur la mezaj paĝoj, eltiru ĝin, ne perdu ĝin, sed sendu ĝin al ni. Se vi skribos viajn nomon kaj adreson, vi partoprenos en loterio. Se vi gajnos, vi ricevos valorajn libro-premiojn!

En la nuna numero, ni multe serĉas kaj trovas! Iru tuj bonaĵojn trovi!

Kore salutas,

Stefan Madgyt 5 apr 94
Via redaktoro.

Juna amiko,
Internacia revuo por
lernejoj kaj komencantoj.
Eldonata de Internacia Ligo de
Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
Aperadas kvarfoje jare en
marto, majo, septembro
kaj novembro.

Anoncoj:
Kvaronpaĝo: 400 HUF
enlande aŭ 40 NLG aŭ 4 jarabonoj
en aliaj okcidentaj valutoj. Duonpaĝo:
600 HUF aŭ 60 NLG. aŭ 6 jarabonoj.
Tuta paĝo: 800 HUF aŭ 80 NLG.
aŭ 8 jarabonoj.

Redaktoro:
Stefan MacGill
Redakcia adreso: pf. 193,
HU-1368 Budapest, Hungario.
Nia konto ĉe UEA: Juna-1
(ĉefe por peranta uzo)
ISSN 0230-1318

Abonprezo ĉe la
abonservo de UEA: 16 NLG.

Ĉe la kasisto de ILEI: 60 SEK. (B. Andreasson, Södra
Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio, pĝk. 682117-7
(Stokholmo). En reform-eŭropo: 350 HUF aŭ 4 USD. aŭ 6DEM
En Hungario: 200 HUF (donacabono por eksterlandano: 350 HUF)
ĉe la hungara ILEI-sekcio: M Kovács, Ady Endre 23-25c, HU-1221
Budapest; konto OTP Budapest XXII ker, fiók 546-006891-8.
Perantoj en tridek landoj; multaj ofertas nacl-valutajn
abon-kotizojn. Plena listo de perantoj kaj kotizoj
aperas en nia tria numero ĉiujare.
Grandaj rabatoj (ĝis 50%) por
kvantaj mendoj.

Perdita — Retrovita

Naskiĝtage, kajton volonte mi ricevos
Flugugi ĝin tre alte, tion mi revos
"Donacu al mi, Paĉjo, kajton,
Havas ĉiu infano tian rajton!"

Dum la festo, Paĉjo, Panjo, kajton donis,
Grandan, ruĝan, ĝi imponis.

Tutan jaron mi ĝin havas
Ĉiam denove, ĝi min ravas.

Sed, unu vento-plenan tagon
Mi ekhavis lud-imagon
Je glora kajt-flugado mi esperis —
Ve! La kajto tute malaperis!


Tra ludilo-stakoj mi manovris
Sed la perditan ne malkovris.

Al Panjo pri la perd' mi plendis,
Ŝi per konsilo min forsendis:
"Kiam laste vi ĝin vidis?
Kaj tiutempe, kie ĝi sidis?
Ja tion vi devas rememori
Tra tavoloj de la menso bori."

Balais mi tra mensa polvo
Ĝis finfine venis solvo:
Dum printempa dom-purigo
Orgio de malord-forigo
Sub la liton mi ĝin ŝovis —
Mi suben rampis ... kaj ĝin trovis!

Mi de nun pli zorge ĝin konservu
Por ke vento-tage ĝi min servu!

Stefan MacGill



KAJTAJ VORT-KLARIGOJ

revl: sonĝi, havi imagon
imponi: doni tre bonan senton
aŭ impreson
ravi: forte ĝojigi
imago: mensa bildo
stako: orda grupo aŭ amaso
mavovri: lerte moviĝi
malkovri: trovi, eltrovi
plendi: esprimi malkontenton
konsilo: sugesto, kion fari
tavolo: plata parto de io *
bori: fosi per turniĝanta ilo *
balal: forpurigi malpuraĵojn de
planko *
menso: pensilo, kiu situas inter
du oreloj
orgio: troiga aŭ ekscesa festo *
rampl: iri surgenue
konservl: gardi, protekti

* tiujn vortojn ni uzas metafore
(vort-bilde) en ĉi tiu poemo.

ANAGRAMO — per AROGA MAN'!

Kio estas anagramo? Ĝi estas paro da vortoj aŭ vorto-grupoj, kiuj ambaŭ enhavas la samajn literojn, sed en alia vic-ordo. Ekzemple: *trovi* — *vitro*. Trovu duan anagramon de la vorto *anagramo*! Jes: *am-angora*!

Jen majesta mult-vorta anagramo pri la nuna numero de nia propra revuo!

ENKURU JENE — IU KOMUNIKA KONTAKTA PETO

EKO KUN JUNA AMIKO PER TUT-UNIKA ENKETO

Ni donas du listojn da vortoj. Ili formas anagramajn parojn. Trovu la parojn!

tordis
biero
trovema
enketa
kajton
malorda
rampis
tavolo
tendaro
karambolo
ne-malaperinton

aldorma
katene
dronate
ombra-loka
volota
distro
pantalon-rimene
varmeto
ebrio
noktaj
prisma

Trovu vi mem pliajn anagramojn en Esperanto!

Trovu la urbojn! En la sekva rakonto ni kaŝis la nomojn de dek ok ĉefurboj el ĉiuj kvin kontinentoj. Trovu ilin! Sendu al ni la liston sur poŝtkarto. Ni loterios premiojn inter ĝustaj respondintoj!

Iŝtvano ŝatas kuiru! Ni povas rimarki evoluon en liaj kapabloj. Jen la irota vojo al la kuirejo — ho, jen lipo-leka iro! Certe io bolis bonodore. "Vidu," klariĝas Iŝtvano, "Mi kuiras unikan beron, kaj post aldono de lakto, kio plu? Ho, jes, ne rajtas manki tomatoj! Kaj plian stimulon donos tipa rizo. Sed se ĝi ekestas tro akva du zorgoj leviĝas: Unue, sekvos longa atendo ĝis ĝi forbolos, due, la rizo tro moliĝos."

"Ĉu tiu estas la tuta manĝo?" mi demandas.

"Ne, krome mi boligos ovojn. Por tio necesas inga puro! Ĉu vi purigos la ovinĝojn por mi?"

"Se mi rajtos manĝi!"

"Bone, sed atentu, mi preparas francan recepton. Ĉu vi kuraĝas engluti ranoĝambojn?"

"Hm. Eble. Mia stomako verŝajne grumblos senkompate, nokte. Kaj aŭskultu, ni soifos sen trinkaĵoj."

"Tiuĵ pretas. Rezultos riĉ-enhava novaĵo kulinara, kiun vi testu per la propra gorgo!"



Paĉjo: Kion vi perdis, Katinjo?
Katinjo: Dudek-forintan moneron!

Paĉjo: Kie vi perdis ĝin?

Katinjo: Tie sub la lito.

Paĉjo: Do, kial vi serĉas apud la fenestro?

Katinjo: Sub la lito estas mallume kaj malpure, ĉi tie estas lume kaj pure!

**serĉo-
ŝerco.**

**SERĈU VI
KAŜITAN
ANAGRAMON!!!**

Nun, vi scias, kio estas anagramo.

Ni zorge kaŝis unu plian anagramon ie en ĉi tiu numero de la revuo. Trovu ĝin! Por helpi vin iomete, la anagramo estas pri malpaca spirito!

LA JES MAŝINO

KONCEPTIS:
STEFAN HAGGILL
DESEGNIS:
PAVEL RAK

NI KOMENCU LA
PREZENTAJON:
ĈI TIO ESTAS 'JES'
MAŜINO, KIAM
AJN MI DIRAS ION
VERAN, ĜI RESPONDOS
JES! ĈU VERE?



EKZEMPLE! ĈU
2+2 EGALAS
KVAR?



ĈU BIRDOJ
KAPABLAS
FLUGI?



FORIRU! BONE!

ĈU JUNA AMIKO
HAVAS 32 PAĜOJN?



ĈU LA SUNO
BRILAS?



ĈU ZAMENHOV
KREIS
ESPERANTON?



BRILA MAŜINO,
ĈU NE?
ĜI PERFERTE
FUNKCIAS! SE
MI DEMANDAS
NENION, ĜI
SILENTAS
KAJ NE
LUMAS.



ĈU 'JES'
ESTAS LA SOLA
VORTO, KIUN
VI KAPABLAS
DIRI?



UNU LASTA DEMANDO
ĈU MI
ESTAS
BELA?



MI SUPOZAS, KE
MI DEVUS
ĈESI PLI
FRUE...



Jean de La Fontaine:

La korvo kaj la vulpo

(Le corbeau et le Renard)

Sidis surarbe korva sinjor',
Tenis fromaĝon per sia bek'.
Vulpa sinjor' – kiun logis odor'
Flatis parole al besta koleg':
"Ho sinjoro korv' salutas mi vin,
Kiel ĉarmas kaj kiel tre vi ravas min!
Sen mensog', se vi pro-kant-sone,
Kiel pro plumoj estus impone,
Estus vi feniks' de l'bosk-loĝantar'."
Ravis la korvon ĝoj' pro l'deklar'.
Por ke montriĝu bela kant',
Falis la predo de la bek-malfermant'.
La vulpo ĝin kaptis kaj diris: "Bonsinjor',
Lernu, ke flatist-fervor'
Profitas de naiva dup':
Ĉi instru' fromaĝon valoras sen dub'."
La konfuzita korvo en hont'
Tarde ĵuris, ke ĝin trafos ne plu tromp'.



Elfrancisigis:
Miklos Feher, Budapeŝto.

KORVO-VULPAJ VORT-KLARIGOJ

flati: diri afablajn vortojn por gajni favoron
mensogo: malvera diraĵo
fenikso: mirinda birdo, kiu kapablas renaskiĝi el flamoj
bosko: grupo de arboj
predo: manĝaĵo, kiun oni kaptis
fervoro: entuziasmo
naiva: sen sufiĉe da pensado
dupo: trompito
honto: malbona sento pro mis-faro
tarde: malfrue
ĵuri: formale deklari



MI JONGLOS POR VI!

Saluton! Mi estas lerta akrobato! Mi povas jongli. Mi jetas pilkojn en la aero kaj kaptas ilin — tri aŭ kvar sam-tempe! Mi aperas en la tria kajero de *Tendaraj tagoj*. Tie, mi vizitas cirkon kaj montras miajn mirindajn talentojn, ĉar mi serĉas laboron. Multaj homoj serĉas laboron nuntempe. Mi devus facile ricevi postenon, ĉar mi estas tre lerta. La cirk-estro estas imponita kaj preta doni al mi laboron ... ĝis ...ĝis ...nu, tiu estas alia rakonto ... legu mem.

Mia gramatika tasko estas enkonduki la uzon de la -N finaĵo por indiki movon al. Ekzemple, mi prenas tason kaj metas teleron sur ĝin. Sur la teleron mi metas glason, kaj sur ĝin mi jetas arakidon.

Tra la tuta libro, ni roluloj jonglas situaciojn kaj gramatikon, por helpi al lernantoj sukcese komuniki.

Mi mallonge gvidos vin tra la tria kajero, en kiu ni renkontas denove la tendaranojn en internacia Esperanta tendaro. Komence, ni prezentas skriban komunikadon — modelajn leterojn kaj poŝtkartojn, per kiuj la tendaranoj akiris siajn unuajn korespond-amikojn. Ili helpas al vi skribi bonajn leterojn!

Vi lernos uzi la vortojn *si* kaj *sia*, kiam la tendaranoj devas restarigi la tendojn post ŝtormo. Plie, fabelo kun malbela sorĉistino memorigas pri la uzoj de -ig-, vizito de mond-vojaĝantoj al la tendaro malfermas la mondon de la Pasporta Servo de TEJO. Tiam ni atingas mian parton de la libro: en la -ON kaj sur la -ON. Unue ni vizitas karton-fabrikon kaj butikon, due Iŝvano prezentas kuir-receptojn, trie mi vizitas la cirkon, kie... ho, ve!



La uzon de -IG- ni montras per tendara ekskurso al ravino. Unue, necesas aŭskulti la veter-prognozon, por scii ĉu la vento mildiĝos, poste ĉiuj enbusiĝas, kaj la aventuro komenciĝas. La tendaranoj kanote trairas la ravinon, sed ĉiu surpriziĝas, ĉar ... nu, legu mem!

Poste la fama spiono 005 kaj la ĉefo Z (konataj el la dua kajero) planas mision repreni la Unuan Libron de Esperanto el Volapukistano. Ni malkovras kelkajn aliajn sekretajn projektojn de Z, kaj fine ekscias, ĉu la misio en Volapukastelo sukcesos aŭ ne.



Iumomente, eksterteranoj vizitas la teron, kaj multaj NIFOj estas raportitaj. La tendaranoj informiĝas pri la Infana Kongreseto, la Gimnazio de ILEI, la IJK kaj UK

kaj aliajn aspektojn de la esperanta mondo. Ne eblas rakonti pri ĉio, sed la lasta evento estas adiaŭa rost-festo apud la rivero.

Kun 76 paĝoj, la tria kajero estas pli dika ol la antaŭaj, ne pro multa gramatiko, sed pro abundo da legaĵoj kaj ekzercoj. Pro la pli varia kaj interesa enhavo (kun roluloj kiel mi, ekzemple!) ajn-aĝaj lernantoj povos uzi ĉi tiun trian kajeron por progresiga kurso.

Sur paĝo 18 vi trovos elpreneblan mendilon (fine de la enketilo) per kiu vi povos akiri la kajeron, kun rabato por kvantoj kaj por samtempa mendo de la tri-kajera kompleto. Kaptu la okazon! Konatiĝu kun mi, kaj eksciu, kial mi ne dungigis!



KURSOJ KAJ ARANĜOJ

Junio

6-10. Andrzej Pettyn gvidos E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj en la somera universitato en Turku. Inf: E-societo, Tiina Oittinen, Puutarhakakatu 26 A 11, FI-20100 Turku.

13-18. Naŭa kvar-nivela Somera E-kurso kun speciala metod-lingvo-kurso por lingvoinstruistoj. Instruisto Georgo Handzlik. Inf: Karliskoga Popola Altlernejo, gvidanto Lars Forsman, Fako 192, S-691 24 Karliskoga, Svedio. tel. 0586-503 60, fakso: 370 77.

25-2.07. Didaktika seminario en Limanowa, Pollando. Inf. pola ILEI-sekcio, Hanna Kwasniewicz, ul. Wieniawskiego 10/48, PL-43-110 Tychy; tel. 118 67 14.

27 - 15.07. E-kursoj ĉe la ŝtata Universitato en Sanfrancisko. Instruos d-ro Duncan Charters, Stefan MacGill (kursotekstoj *Tendaraj tagoj* kajeroj du kaj tri) kaj Joachim Werdin, kun aparta emfazo al didaktiko kaj instru-teknikoj. Reginald Jaderstrom redaktos la kurs-bulnenon. Info: C. Schulze, Esperanto, 410 Darrel Rd. Hillsborough, CA 94010-6710. Usono.

Julio

3-16. Somera Esperanto-Lernejo, Poprad. Inf. E-Centro de SEA, Sobotské nám. 6, SK-058 01 Poprad, Slovakio. (ripeto 7-20 aŭg.)

4-10 Somera Universitato kaj E-klubo Jyväskylä. 27-an Someran E-studsemajnon, divers-gradan. Instruistoj kaj ekzamenantoj s-ino Barcsay Zs. kaj d-ro T. Dahlenburg. Inf: s-ino Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FI-40630 Jyväskylä, Finnlando. (el *Heroldo*).

7-12 Bouresse, Francio. Kurso por instruistoj, gvidas s-ino Katalin Smidéliusz. Adreso: La Kvinpetalo, Centre Esperantiste, Rue de Civaux, FR-86410 Bouresse, Francio; tel. 010-33-49-428074.

9-15. Eŭropa Esperanto-Festivalo, Budapeŝto. Inf. HEA, pf. 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario.

10-15. 30a Brazilia Kongreso de Esperanto, Natal. Inf. Asocio Potigvara de Esperanto, Caixa Postal 291, BR-59001-000 Natal.

15-20. Deka Internacia Metodika Seminario (IMS), Viljandi, Estonio. Temo: Intensaj lingvo-kursoj. Paralele funkcios intensa kurso por komencantoj. Informoj kaj aliĝilo en *IPR 93/4* aŭ de s-ino Barcsay Zs., Bem Rakpart 25B, HU-1011 Budapeŝto, Hungario.

15-21. Internacia Junulara Semajno (IJS), Kőszeg, Hungario. Inf.: IJS, pf. 263, HU-8901 Zalaegerszeg, Hungario; fakso: (92) 369-010.

15-22. Intensiva pretiĝo al la ekzamenoj UEA/ILEI kun prelegoj pri la metodiko de E-instruado. KCE, Svislando. Gvidos s-ino Katalin Smidéliusz el Hungario.

16-23. 67a SAT-Kongreso, Straznice, Ĉeĥio. Informoj: pk. 36, CZ-696 62 Straznice, Ĉeĥio; tel. (631) 942 507.

23-30. 79a Universala Kongreso de Esperanto, Seulo, Koreio. (Informas UEA)

30-6.08 50a Internacia Junulara Kongreso, Chonan, Koreio. (Informas UEA/TEJO)

30-5.08 28a Konferenco de ILEI, Kangnam, Koreio (30km sude de Seulo). Temo: La aziaj edukado kaj kulturo. Informoj: D-ro So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do, KR-499-900, Koreio.

31-5.08 Lingvokursoj por komencantoj kaj progresintoj. KCE, Svislando.

27.08-14.10 komencanta kaj 24.10-20.12 Progresinta kursoj en Karliskoga, Svedio.

Aŭgusto

1-10. Eŭropa Skolta Ĵamboreo, Dronten, Nederlando. Skolta Esperanto-Ligo organizos partoprenan grupon. Samloke unu jaron poste okazos la Monda Ĵamboreo. Informoj: Arie Bouman, Disedreef 8, BE-9030 Gent, Belgio.

21.8-3.9 Esperanto Centro Gresillon, Kurso por instruistoj Adreso: Kultura Esperanto-Domo, Gresillon, FR-49150 Bauge, Francio; tel. 010-41-891034.

Septembro

3-10 Apudmaraj kursoj kaj ripozado, Sete, Francio. Informoj: s-ino Y. Vierende, 5 rue Dr. Roux, FR-34000 Montpellier, Francio; tel. 67 59 55 74.

Oktobro

8an. Studotago de la nederlanda instruista grupo NGGE en Den Haag. Informoj: H. ten Hagen, 587 Middenweg, 1704 BH Heerhugowaard, Nederlando. (*La strai-numero aperis erare en IPR 93/4. Ni pardonpetas. 587 ĝustas.*)

23-28 Lingvo-kursoj KCE. Povos okazi tritaga instruista kurso en Budapeŝto aŭtune pri la uzo de la tria kajero de *Tendaraj tagoj*, se estas interesiĝo.

Por plenaj kalendaroj, vidu la martan *Esperanto* aŭ la koncernan numeron de *Heroldo*. *Eventoj* regule aperigas informojn pri aranĝoj.

KCE, Kastelo Grésillon, Kvinpetalo, Monda Turismo en Bydgoszcz, EC en Poprad kaj aliaj okazigas aranĝojn tra la jaro. Petu plenajn programojn de ili! Kompilis MB/SMG

MALKOVRIGA KRUCENIGMO!

La sekva enigmo estas sufiĉe simpla ankaŭ por novaj lernantoj de la lingvo, tial ni proponos premiojn nur por legantoj malpli ol 16-jaraj. Gajnontoj en nia loterio malkovros la mondon de *Tendaraj tagoj*, ĉar la premioj estos ĝia tria kajero. Sendu viajn solvojn poŝtkarte al: *Juna - amiko*, pf. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario, ĝis la 30a de junio 1994.

Pluraj el la solvoj rilatas al malkovrado – tuj malkovru ilin vi!

1		2		3	4	5
				6		
7			8			
		9				
10	11					12
13				14		

(R) = uzu nur la radikon

Horizontale

- Fari vojaĝon aŭ laboron por malkovri ion.
- Verda besto, kiu kvakas, alte saltas, kaj vivas sur tero kaj akvo (ĝi estas amfibio). (R)
- Homo, kiu profesie rond-irigas ion – supon, ekzemple. (R)
- Akvo-barilo.
- Ekscii la lokon de io, kiu estis ĝis tiam nekonata.
- Apartenanta al iu.
- Rekonilo aŭ vokilo por homo, besto aŭ objekto. (R).

Vertikale

- Sisteme kolekti informojn por ekscii la opiniojn de multaj homoj.
- Ne plu scios la lokon de io.
- Deveno. (R)
- Hom-grupo, sange parenca.
- Aktiva pasinta participo. Trajno, kiu foriris, estas forir _____ a.
- Neologismo por maldekstra (R). Krome, 54 romie.



Kiel estu por komencantoj?

Ni ricevis fine de la antaŭa jaro komenton de praktikanta instruisto en Belgio pri *Juna amiko* kaj precipe de la numero 93/3 kaj kiel ekzemplo, pri unu legendo tie prezentita.

"Jen mia ĝenerala rimarko pri JA: mankas tekstoj por komencantoj. Miaj gelemnantoj sekvas Esperanto-kurson ekster la lernejoj, dum duona horo, dufoje en la semajno. Mi ege bedaŭras, sed mi ne volas doni al ili la lastan numeron (93/3). Ĉu vere ĝi estas destinita por lernejoj? Por ke mi ne aspektu la tioman kritikanton, mi prezentas al vi reverkaĵojn, kiujn mi faris por miaj gelemnantoj, de la meksikia legendo Marimba (p. 22)."

Ni escepte reaperigas la saman legendon en du simpligitaj versioj, por helpi al legantoj juĝi, ĉu ili preferas pli simplajn aŭ pli kompletajn, kompleksajn formojn de rakontoj. Plie, ĝi donas bonan modelon por instruistoj kaj legantoj, kiuj eble volas verki por ni.

S-ro Wylleman, el Ostendo, plue klarigas: *"Mian pli facilan tekston mi prezentis voĉlegante ĝin kaj konstatis, ke ĝi estas je taŭga nivelo. Ekzemple, lernantino faris la rimarkon, ke ankaŭ la violono estas farita el ligno. Ĉu ankaŭ pri tiu muzikilo ekzistas legendo?" ŝi demandis.*



aliaj indianoj iras al la muzikarbo, sed ĝi silentas. Post tri tagoj la indianoj volas haki la arbon, ĉar ili estas malkontentaj. Ili prenas hakilon. Ili frapas per la hakilo kaj ili aŭdas muzikon. Ili forkuras.

Birda Plumo iras nun al la arbo. Li ploras.

La arbo diras: "Ne ploru, kara knabo. Vi povas haki min. Vi prenu mian lignon kaj via domo estos plena de muziko."

Parola formo

Birda Plumo estas juna indiano. Li iras en la arbarego. Li aŭdas voĉojn. Ne homoj parolas, sed la arboj: "Ni volas helpi la indianojn."

Pli ol centjara arbego diras: "En mia ligno estas muziko, kiel la kantoj de la birdoj."

Birda plumo aŭdas tion kaj kuras al la vilaĝo. La

Tiel faras Birda Plumo. La aliaj indianoj helpas por fari muzikilon.
Ili frapas per bastonetoj sur la ligno kaj la muziko estas kiel birdokanto. La indianoj sentas sin liberaj kiel la birdoj!

Demandoj:

1. Kiel nomiĝas la juna indiano?
2. Tre granda arbaro estas ...
3. Ĉu vi kredas, ke arboj parolas?
4. Tiu ĉi rakonto estas ...
5. Kiom da jaroj estas en jarcento?
6. Oni skribas per skribilo. Oni hakas per Oni muzikas per



Skriba formo de la fabelo:

Marimba (meksikia legendo)

'Marimba' (en Esperanto 'marimbo') estas nacia muzikilo de indianoj. Oni frapas ĝin per bastonetoj, kiel ksilofonon. Indiana legendo rakontas de kie devenas la marimbo.

Iun tagon juna indiano Birda Plumo iris al la ĝangalo kaj aŭdis strangajn voĉojn. Ne homoj parolis, sed arboj. Ili parolis pri la malfeliĉa sorto de la indianoj. Vi komprenas ke Birda Plumo atente aŭskultis. "Ĉu ni sufiĉe helpas la indianojn? Ni retenas por ili la humidon, nian lignon ili uzas por konstrui domon kaj hejti ĝin. Sed ĉu ni havas ion gajan por doni al ili?"

Tiam ekparolis grand-aĝa arbo: "Karaj fratoj, mi rakontos al vi mian sekreton. Sub mia ŝelo kuŝas la plej belaj kantoj de birdoj. Aŭskultu!". En la sama momento Birda Plumo aŭdis belan muzikon. Estis vera koncerto! La juna indiano kuris al la vilaĝo kaj rakontis ĉion al siaj amikoj.

La postan tagon ili ĉiuj iris en la ĝangalon, trovis la muzik-arbon sed ĝi silentis. La junuloj atendis dum kelkaj tagoj, sed ne aŭdis muzikon. Tiam ili decidis forhaki la arbon. Ili iris hejmen, prenis hakilojn kaj revenis. Sed ... kiam ili ekfrapis la arbon per la hakiloj ... ĉe ĉiu hakil-frapo venis el la arbo bela sono. Eksterordinare! Pro timo la hakantoj forkuris, sed ne Birda Plumo. Li iris al la arbo, ĉirkaŭ-prenis ĝin kaj ekploris. La arbo flustris:

"Ne ploru, kara knabo, mi estas grand-aĝa arbo kaj vi povas haki min. Vi prenu mian lignon hejmen kaj via domo estos plena de muziko."

Tiel faris Birda Plumo, kaj en la vilaĝo la aliaj indianoj helpis lin fari el la ligno muzikilon. Kiam ili frapis ĝin per bastonetoj, ili aŭdis gajan muzikon, kiu por ili estis kiel la liberaj flugo kaj kanto de la birdoj.

* * * * *

Plaĉe tuŝas mian koron

Plaĉe tuŝas mian koron la sunkuŝiĝa horo,
kiam ombroj fantomece ŝtele rampas,
kiam velkas sur ĉielo la fandiĝanta gloro,
kiu ĉion ĉie per orlumo stampas.

Plaĉe tuŝas min la burdo videble troŝarĝita,
kiu zumas ĉe la rozoj malgracie –
la rid-tintoj de la bebo am-fida kaj invita –
kaj alaŭdo, kiu fajfas rapsodie.




Plaĉas, kiam la cikadoj ekstreĉas sian klikon –
kaj trumpetas asfoletoj al la suno –
kiam kampoj aperigas buntbildan mozaikon –
kaj la silueto de tutvela skuno.

Plaĉe krakas la kameno dum vintra vento veas
kaj la fora monto arbe tatuita –
la aŭtuna bruno, kiam folioj ekpereas –
la trankvilo de la kosmo infinita.

Plaĉe tuŝas fiŝboato kun kirlo da kriĉ-mevoj –
la odoro de jasmeno trafenestre –
plaĉas fari en fald-seĝo kastelojn el bel-revoj –
kaj muziko de la marĉo birdorkestre.

Plaĉas longe luksi vintre en varmo de bankuvo –
la kandela danco sur festena kuko –
la konvojoj da nub-ŝipoj ŝtorm-pezaj antaŭ pluvo –
la ronrono kata kaj kokina kluko.

Kiel plaĉas la rondiro, la sekvo de l'sezonoj –
la kontrastoj de la nokto kaj de l' tago;
plaĉas sano kaj feliĉo, plej gravaj vivo-bonoj,
la plezuroj de la sensoj – kaj imago!



*Bertram Potts
Nov-Zelando.*

Vort-klarigoj por la
poemo sur la
antaŭa paĝo

velki: malkreski, malfortiĝi.
fandiĝi: transiri de solida al
likva formo, ekz. de glacio
al akvo. Uzata en la poemo
metafore.
burdo: abeleĝo.
gracie: elegante, bele.
tinto: sonoreto.
alaŭdo: birdo, kiu kantas bele.
rapsofle: ĝoj-kante.
asfodelo: bela blanka kaj fla-
va printempa floro.
mozaiko: bildo farita el multaj
etaj koloraj pecoj.
silueto: kiam ni vidas nur la
formon (konturon) de ob-
jekto kaj ne ĝian detalon.
skuno: speco de vel-boato.
tatuita: kun bildo sur la haŭto.
perel: komplete malaperi, tute
perdi la ekziston.
kirlo: forta rondira movo.
kriĉi: eligi akran sonon.
kluko: sono, kiun ofte faras
kokino.
sensu: tion, kion oni percep-
tas (sentas) per orelo, oku-
lo, nazo, buŝo aŭ haŭto.

Bertram Potts (1895-1994)

Tra la jaroj ni kelkfoje aperigis belajn vers-
aĵojn de mia samlandano, Bertram Potts. Li
verkis centojn, kaj multaj el ili estis presitaj
en la libro *Poezia bukedo por geknaboj de la
mondo*, kiu aperis en 1978. S-ro Potts estis
esperantisto ekde 1912, poste li elmigris de
Anglio al Nov-Zelando, kie li estis pioniro
de la Esperanto-movado. En 1957 li mond-
vojaĝis kaj mult-lande prelegis pri la pra-
historio kaj Maorioj de Nov-Zelando.

En la sesdekaj jaroj mi partoprenis, kiel
junuleto, intensajn unu-semajnajn kursojn,
kiujn li gvidis por instruistoj. Mi lernis de li
multon pri la lingvo kaj abundon da viglaj
instru-teknikoj.

Nun fine, 99-jara, post bunta kaj plena
vivo, li mortis, preskaŭ samtempe kun la
97-jara Mary Potts, lia edzino dum 73 jaroj.

La poemo sur la antaŭa paĝo estu oma-
ĝo al tiu rimarkinda esperantista paro.

Stefan MacGill

ENKETILO SUR LA MEZAJ PAĜOJ!

Jen via okazo! Ni donas al vi voĉon! Vi povas diri al ni, kion vi opinias pri Ju-
na amiko. Ni volas redakti ĝin demokrate, laŭ la deziroj kaj bezonoj de la le-
gantoj. Legu zorge la demandojn. Ofte necesas nur elekti respondon aŭ
respondojn el listo, kiun ni donas. Tiukaze metu ikson (X) en la kestoj apud
la respondo, kiun vi elektas. Vi rajtas skribi pli longajn respondojn sur aparta
folio kaj kunsendi tion. Samtempe vi (aŭ via instruisto) povas mendi librojn.
Kaj respondantoj povos gajni valorajn librojn en nia loterio. La enketilo
havas sencon, nur se multaj legantoj respondos ĝin! **Do, nepre faru!**

Ni demandas pri la facileco de la lingvo-uzo en la gazeto. La artikoloj sur
la antaŭaj paĝoj donas bonan ekzemplon, ĉar la sama fabelo estas verkita je
tri lingvo-niveletoj (por komencantoj kaj post-komencantoj en la nuna numero,
por progresantoj en antaŭa). Kiu plej plaĉis? Kiujn vi povis bone kompreni?

ENKETILO pri JUNA AMIKO

Lando

Kiu vi estas?

- lernanto (de Eo) ekster lernejo Instruisto ne instruanta Eon alia
 lernanto (de Eo) en lernejo Instruisto instruanta Eon denaska espisto

Dum kiom da jaroj vi scias Esperanton?

Dum kiom da jaroj vi studas/is Esperanton?

Dum kiom da jaroj vi legas *Juna amiko*?

Kiom vi ŝatas la sekvajn rubrikojn/erojn en la revuo?

Tre Iom Ne

- Fabeloj
 Faktaj raportoj
 Skeĉoj, dialogoj
 Rol-ludoj
 Kantoj
 Poemoj

Tre Iom Ne

- Novajoj pri Esperanto
 Tabul-ludoj
 Bild-strioj
 Krucvort-enigmoj
 Aliaj konkursoj
 Korespondi deziras

Lernantoj: ĉu vi jam respondis al korespond-peto en JA?

Instruistoj: ĉu viaj lernantoj iam faris tion?

- Ne Jes, unufoje Jes, du-tri foje Jes, multfoje

Kia estis la rezulto?

- Tre bona Iom bona Nekontentiga Katastrofa

Aldonu klarigon (daŭrigu sur aparta folio, se vi volas):

.....

.....

Kion vi opinias pri la lingvaĵo de JA?

tro simpla taŭga iom komplika multe tro komplika
(adonu specifajn komentojn sur aparta folio).

Nomu kelkajn artikolojn kiujn vi **plej ŝatis** el la lastaj du jaroj. Laŭeble aldonu la numeron, (ekz. 92/3):

.....
.....
.....
.....
.....
.....
.....

(Instruistoj aldonu "uzis" se vi povis uzi la koncernan artikolon)

Nomu artikolojn, kiujn vi **pleje ne ŝatis** (aŭ ne povis uzi):

.....
.....
.....

Pri kiuj temoj vi volonte legos en Juna Amiko?.....

.....
.....
.....
.....
.....

(aldonu "V" se vi mem povos verki por ni pri la temo)

Por kiuj aĝoj estu ĉefe JA? (vi rajtas hoki pli ol unu!)

5-8 9-12 13-15 16-20

Por kiu(j) grupo(j) estu ĉefe JA (pli ol unu eblas)

komencantoj post-komencantoj mez-niveluloj progresantoj

Ni povas foje doni legaĵojn, kiujn vi povas individue (sole) legi, kaj foje ludojn aŭ ekzercojn por grupa uzo kun instruisto. Kiun vi preferas?

Ĉefe legaĵojn por soluloj Grupajn aktivecojn Ambaŭ

Kelkfoje ni provas prezenti gramatikajn temojn, aŭ ekzercojn ligitajn al gramatiko. Ĉu bone? Ĉu estu pli aŭ malpli?

Pli Malpli Ne

 Legaĵoj neligitaj al gramatiko
 Gramatikaj klarigoj kaj artikoloj
 Aktivigaj ekzercoj por bonigi la gramatikajn sciojn

Kion vi opinias pri la vort-listo kaj vort klarigoj?

Bonaj Nebonaj Uzu la liston pli multe
 Donu pli da vortklarigoj

Dankon pro viaj respondoj! Bonvolu resendi la enketilon al Juna amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario. De ekster Eŭropo, laŭeble sendu aerpoŝte. Pliaj komentoj kaj opinioj estas bonvenaj sur aparta paper-peco, kiun vi aldonu al la enketilo. Vi povas krome mendi librojn per la dorsa mendilo.

Vi rajtas resendi la enketilon anonime, sed se vi volas partopreni la enketilan loterion aŭ mendi librojn, vi devos skribi vian nomon kaj adreson:

Nomo:

Adreso:

Bonvolu aldoni min al la loterio por ricevi

kompletan de Tendaraj Tagoj Danĝera Lingvo (Lins)
 La Metodikaj libroj de Rakuŝa kaj Szanser

LIBROSERVO DE ILEI

Sendu al: *Juna amiko*, pf. 193, HU-1368 Budapeŝt, Hungario. (94/1)

Mi mendas la sekvajn titolojn: (v. apud-paĝe kvant-rabatojn!)

	Kvanto	Sumo
Tendaraj tagoj, kajero 1. po 12 NLG/ 50 SEK ĝis 4 ekz. . .	_____	_____
Tendaraj tagoj, kajero 2. po 15 NLG/ 60 SEK ĝis 4 ekz. . .	_____	_____
Tendaraj tagoj, kajero 3. po 18 NLG/ 75 SEK ĝis 3 ekz. . .	_____	_____
Tendaraj tagoj, kompleto. po 39 NLG/160 SEK ĝis 3 komp.	_____	_____
Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado, Szanser, 24 NLG	_____	_____
La danĝera lingvo, Lins. 36 NLG/ 150 SEK / 600 HUF . .	_____	_____
Legendoj pri SEJM, Bronŝtejn 6 NLG / 24 SEK / 80 HUF	_____	_____
Spegularj E-insignoj el Kievo. 2 NLG/ 8 SEK / 40 HUF .	_____	_____
6 ekz. <i>Juna amiko</i> : 92/1-4 + 93/1 kaj 2. 10 NLG / 40 SEK .	_____	_____
Abono <i>Juna amiko</i> por 1994 16 NLG/ 60 SEK	_____	_____
(rabatoj por kvantoj, nacilingvaj kotizoj, vidu nian numeron 1993/3)		
'Valoro de Esperanto' (Symoens, angle) 6 NLG/ 20 SEK .	_____	_____
'Valoro de Esperanto' (Symoens, france) 6 NLG/ 20 SEK	_____	_____
Oni ne pafas en Jamburg, Bronŝtejn 12 NLG / 50 SEK . .	_____	_____
Metropoliteno, Varankin 25 NLG/ 100 SEK / 400 HUF .	_____	_____
Ĝeneralaj scioj, test-libro. 6 NLG / 24 SEK / 80 HUF . . .	_____	_____
Impeto 91 (Progreso) 246p. 6 NLG / 24 SEK / 80 HUF . .	_____	_____
SUMO:	_____	_____

Subskribo:..... Dato:.....(adreso dorse!)

Ne antaŭpagu la mendojn. Ni sendos fakturon kun la libroj en nederlandaj guldenoj kaj svedaj kronoj. Nederlandajn pagojn oni povas fari al la konto de ILEI, ilek-a ĉe UEA. Svedkronajn pagojn oni povas fari al la kasisto de ILEI. La fakturoj donos plenajn pag-detalojn. La forintaj prezoj (HUF) validas nur por loĝantoj de reform-eŭropo! De libroj ne-eldonitaj de ILEI ni havas nur limigitan kvanton! Niaj prezoj *inkluzivas* la surfacajn ekspedokostojn. Se vi volas aerpoŝtan liveron, bv. aldoni 30%. Ni petas pagojn ene de 30 tagoj.

Nun, vi klare scias, kial ĉi tiu numero de *Juna amiko* devis malfrui!
 Jes, ILEI anoncas kompletigon de la lernolibra serio

Tendaraj tagoj

per la apero de la tria kajero.

Ĉi tiu serio celas helpi al unuavice 10- ĝis 14-jaruloj lerni Esperanton sub la gvido de instruisto. Ĝi vivigas la situaci-komunikon aliron al lingvo-lernado – dialogoj, ekzercoj kaj rol-ludoj spronas konversaciadon en Esperanto.

Vidu la ĵonglistan prezenton de la verko sur paĝoj 7 kaj 8. Ni invitas mendojn, ĉu ĉe UEA aŭ aliaj libroservoj, ĉu ĉe ILEI per la apuda mendilo.

- Ĉe UEA la prezo estas 18,00 NLG. (15 NLG por la dua kajero kaj 12,00 NLG por la unua). Ĉiukaze kun triona rabato ekde tri ekzempleroj, plus 10% por surfacaj sendokostoj.

- Ĉe ILEI la subaj prezoj inkluzivas la surfacajn sendokostojn, kaj ni donas rabaton por samtempa mendo de ĉiuj tri kajeroj samtempe: anstataŭ 45 NLG, vi pagos 39 NLG. por unu kompleto. La unua kajero ĉiam temos pri la reviziita kaj ampleksigita dua eldono, aperinta en 1993. La forintaj prezoj validas nur por loĝantoj de reform-eŭropo!

KIOM	KAJERO 3	KOMPLETO	KIOM	KAJERO 1	KAJERO 2
Unu ekz.	18 NLG 75 SEK 250 HUF	39 NLG 160 SEK 420 HUF	Unu ekz.	12NLG 50 SEK 110 HUF	15NLG 60 SEK 140 HUF
Ekde 4 po	12 NLG 50 SEK 210 HUF	29 NLG 120 SEK 400 HUF	Ekde 5, po	8NLG 35 SEK 100 HUF	10NLG 40 SEK 120 HUF
Ekde 12 po	11 NLG 45 SEK 200 HUF	25 NLG 100 SEK 380 HUF	Ekde 15, po	7NLG 30 SEK 90 HUF	9NLG 35 SEK 110 HUF

Tendaraj tagoj, kajero III, Stefan MacGill. ILEI, Budapeŝto, 1994. 29 cm. 76p. Broŝ. kun plastumita kovrilo. Ilus. Pavel Rak. ISBN 963 04 3957 03 (tria kajero); ISBN 963 04 1162 0 0 (la kompleto).



ILEI ofertas kvantan rabaton por sia alia lastatempe aperinta verko: *Teoria kaj praktiko de lingvo-instruado*, Mag. Irena Szanser, 174p., firme bindita. po 18,00 NLG aŭ 55 SEK ekde tri ekzempleroj. Por unu ekz. 24 NLG, 96 SEK aŭ 600 HUF. Bv. pacienci pri livero ĉar la stoko kuŝas en Litovio kaj ne en Budapeŝto.

Deziras korespondi

Nia rubriko estas aparte longa ĉi-foje, kaj bone memorigas nin al kiom bunta kaj granda monda familio ni apartenas! Memoru, ke en multaj landoj eĉ la prezo de poŝtmarko por internacia letero estas alta. Se vi mem povas tion fari, aldonu internacian respond-kuponon por faciligi al via korespond-amiko respondi sen prokrasto! Plezuram korespondadon!

Albanio

Grupo de dek unu gimnaziaj studentoj (16—18-jaraj) dez. kor. kun samaĝuloj el aliaj landoj pri ĉ.t. Kontakto: Shllaku Bledar, Gjmnazi, Kukes, Albanio.

Benino

Gbadamassi Latifou, s/c Lassissi Amo Barika, Quartier Guinkomey, Lokossa (Mono), Benino. Junulo dez. kor. tutmonde pri div. temoj. Kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn, monbiletojn kaj monerojn, ŝatas modernan muzikon.

Brazilo

Luiz Fernando Sambinelli, Rua Nivaldo Zorzetto, 61 Vila Dias, BR-13800-000 Mogi Mirim (SP). 16-jara, ŝatas muzikon, skribi, babili kaj danci. Parolas france, hispane kaj Esperante.

Carla Eduardo de Oliveira, Av. Getulio Vargas, 510, BR-13140-000 Paulina (SP). 17-jara junulo dez. kor. kun 15-20-jaruloj el Hungario, Kroatio, Ĉeĥio kaj Hispanio. Ŝatas legi, vojaĝi; kolektas poŝtmarkojn kaj pk-ojn.

Ĉeĥio

Dudeko da progresantaj gelnantoj el la urbaj kursoj en Terezin, Roudnice, Lovosice kaj Kralupy n/Vlt ĉiuj serĉas korespondantojn. 13—15-jaraj. Skribu al ilia instruisto por ricevi precizan liston de adresoj: d-ro František Vesely, císlo 183, Okres Melnik, CZ-277 03 Horni Pocaply.

Francio

Houget, Héléne, 13 rue du Pradonnais, F-44350 Guerande. 15-jara junulino dez. kor. kun 16—20-jara junulo aŭ junulino, ĉefe en

Italio. Ŝatas aŭskulti kaj ludi muzikon (piano), filmojn de Hitchcock kaj tiujn de la usona kino-epoko 1950-60.

Grupo de 12 9-jaraj lernantoj, eklernintaj la lingvon en decembro 1993, serĉas kontaktojn tutmonde: interŝanĝo de poŝkarto pri niaj urboj kaj landoj, desegnaĵoj pri niaj lernejoj kun kelkaj klarigaj frazoj aldonitaj. Skribu al la instruisto: Pierre Bouvier, Ecole Ozanam, 29 rue des Argentiers, F-87000 Limoges.

Trideko da 13—15-jaraj gelnantoj dez. kor. tutmonde. Ni donos kelkajn el la hejmaj adresoj. Pere de ili eblas kontakti ankaŭ pliajn korespondemulojn. Al ĉiu adreso krom la unua aldonu la urbo-nomon: F-62230 Outreau: Angélique Bourgain, 11 rue François Mauriac, F-62480 Le Portel; Aurélie Bourgain, 83 rue des Tilleuls; Marjorie Sergent, 16 place Carnot; Emmanuelle Lefebvre, 179 rue du Mont Neuf; Emile Marseille, 80 rue Jules Ferry; Nathalie Lanoy, 26 Rue J.S. Bach (ĉiuj ĝis nun knabinoj, sekvas nun knaboj); Cédric Delattre, 145 rue des Platanes; Olivier Leprêtre, 74 rue Jean Jaures, Sébastien Pecron, 19 rue de l'Orme, Gwenaël Bernard, 105 Rue Marcel Sembat.

A. Hubert, 13, Chemin de la Solitude, F-57200 Sarreguemines, emerita instruisto, starigos klason de Esperanto por 14-15-jaruloj kaj deziras ricevi kuraĝigajn poŝkartojn, kiujn ili reciprokos, kaj povos evolui al regula interŝanĝado.

Esperanto-Klubo, Collège publique, F-63700 Saint Eloy les Mines, 12-ĝis 15-jaraj gejunuloj dez. kor. tutmonde pri ĉ.t.

Esperanto-Klubo, Collège publique, F-63390 Saint Gervais d'Auverne, same.

Esperanto-Klubo, Collège publique 'Condorcet', F-63290 Puy Guillaume, same.

Pascale kaj Samuel Gaillard, 50 ave. du Livrados, F-63800 Cournon d'Auverne; tel. (33) 73943131; fakso (33) 73347720 sendis la tri suprajn kontaktojn kaj povas liveri pluraĵojn da similaj adresoj, ankaŭ de bazlernejoj (3—12-jaraj), kaj de skoloj kaj de instruistoj interŝanĝantaj pri Esperanto.

Germanio

Esther Trautmann, Oberstr. 69, D-99706 Sonderhausen. 12-jara junulino, kies hobiaj estas libroj, moderna muziko, Esperanto kaj la angla lingvo.

Hungario

Horváth Tamás, Nagy Sándor utca 5, fszt. 2, H-1195 Budapest. 16-jara junulo serĉas simil-aĝan junul(in)on el Danlando, Svedio aŭ Nederlando. Ŝatas la ludon AD&D.

Nagy Szilvia, Száraz u. 29, H-1104 Budapest. 17-jara junulino, kun similaĝa junul(in)o el Brazilo, Danlando aŭ Britio. Ŝatas ekskursi, aŭskulti muzikon, amas etajn infanojn, ŝatas bestojn, precipe hundojn.

Gajdos Pál, nun gvidas grupon de 10—14-jaruloj, kiuj dez. kor. tutmonde. Ni provos aperigi grup-foton en la posta JA. Skribu al: Esperanto-koresponda klubo, Kinizsi Pál lekola, Kurucz u. 32, H-4028 Debrecen.

Irano

Amir Mohamady, No 4, Mohamady Lane, Ayatullah Kashani Ave., IR-69166 Borujerd. 16-jara studento dez. kor. tm. pri ĉ.t. precipe interŝanĝi bk. kaj pm. kaj kolekti sportajn revuojn kaj E-librojn. Respondo garantiatal

Bahram Karimzadeh, No 52, Golestan Lane, Ayutallah Kashani Ave., IR-69166 Borujerd. 17-jara studento deziras same korespondi.

Irlando

Kata Kinsella, 20 Beau St., Waterford. 15-jara, dez. kor. tutmonde. Kolektas bildojn kaj statuojn de delfenoj. Amas lingvojn kaj ŝatas legi. Interesiĝas pri muziko, libroj kaj aliaj landoj. Ŝatas trinki multe da teo!

Kenjo

Bokola Esperanto-Klubo, e-ro Maxwell Odiyo Anangweh, P.O. Box 92051, Mombasa. La klubanoj estas Ennice Swabo, Pamela Ogada, Jacktone Andebe, Emmanuel Mwandoyi kaj Irene Adhiambo. Oni kunvenas dufoje tage de lundo ĝis vendredo dum tri horoj. La sola lernolibro estas svahila-Esperanta vortaro. Deziras interŝanĝi desegnaĵojn, ludilojn, kartarojn, vidbendojn, poemojn kaj murgazetojn. Volonte ĝemeliĝos kun alilandaj grupoj. Bezonas lernilojn.

Deogratias Cima, Zairean Community, Group 61, Kakuma Refugee Camp, Box 43801 (UNHCR), Nairobi. 14-jara zaira rifuĝinto, mem-instruita unu-jara esperantisto dez. kor. tutmonde.

Koreio

Seula Esperanto-Kulturcentro, P.O. Box 3047, KR-100-630 Seoul, arigas adresojn de junaj koreanoj, kiuj deziras korespondi. Anoncu vin!

Kubo

Isnel Pupo Pena, Rua 19, nr. 57, y 2548 Reparto Sanfield, Huguín, 23-jara instruisto de Esperanto, lutisto. Interesiĝas pri muziko, politiko kaj eksterlandaj lingvoj.

María Luz Moya Luna, Zamorana 9 1/2 entre Aguilera y 1 Ra, Rpto: Zamorana, CU-90300 Santiago de Cuba. Instruistino de 10—14-jaraj lernejoj, kiuj dez. kor.

Héctor Jiménez, Ave. 47, Mr. 3803, e/38 y 40, Rpto. Kohly, Playa, La Habana. Dez. interŝanĝi spertojn pri instruado de E en lernejoj kaj korespondaj kursoj.

Latvio

Ramona Brale, D. Braantzalna str. 7-26, LV-1082 Riga. 11-jara knabino serĉas samaĝulojn en Eŭropo. Ŝatas danci, bicikladi kaj vojaĝi.

Malagasa DR

Bruno Randrianarivelo, Lot IVB 71, Ambohimiadana Sud, Antananarivo 101, instruas tri klasojn kun lernantoj 12- ĝis 35-jaraj, kiuj volonte korespondos.

Nigerio

George Onuh, Ukwonyo Wesley School, Utonkon, Benue State. Givdas kursojn por 9- ĝis 15-jarulojn, kiuj dez. kor. Ili lernas per plenumo de dramoj kaj bezonas librojn, kasedojn kaj vortarojn por pli bone lerni.

Francis Mary Onyeneke, P.O. Box 216, Bauchi, Bauchi State. 20-jara. Interesiĝas pri ĉ.t., dez. kor. tutmonde, aĝo ne estas baro.

Elvis Onyeneke, P.O. Box 1269, Owerri, Imo State. 19-jara, kolektas poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.

Pollando

Danc-ensemblo 'Cepella', Mgr. Zbigniew Rosiak, Osiedle B. Smialego 12/15, PL-60-682 Poznan 60. Tiu 40-persona ensemblo serĉas personan interŝanĝon kun similaj grupoj en Hungario aŭ Italio, kun tranoktado ĉe familioj de la junaj artistoj.

Rumanio

Vasile Albu, Eroilor 9, R-2400 Sibiu, havas tridekon da lernantoj inter 12- kaj 18-jaraj (ĉefe 17-jaraj), kiuj dez. kor. pri ĉ. t.

Rusio

Avdejeva Nataša, str. Pionerskaja 175 kv. 8, RUS-353320 Abinsko (Kraŝnodara regiono). 14-jara knabino dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kolektas bildkartojn.

Diščenko Tuba, str. Neftepromislovaja S 143, RUS-353320 Abinsko. 14-jara knabino pri ĉ. t.

Melčarov Evgenij, Str. Krimskaja, d.27, kv.55, RUS-353320 Abinsko. 17-jara junulo, pri ĉ. t. Kolektas poŝtmarkojn.

Vejnin Aleksandr, 35-jara instruisto, str. Pobedi 24a, RUS-353320 Abinsko. Dez. kor. tutmonde kaj invitas al kunlaboro pri turismaj interŝanĝoj kaj reciprokaj vizitoj.

Erjomenko Deniso, ul. Jubilejnaja 33-1-56, RUS-623520 Suĥoj Jog (Ekaterinburga regiono). 16-jara. Kolektas pm, glu-etikedojn de vinboteloj kaj Esperantajn.

Svedio

Alexandra Száraz-Hoffer, Siklőjevägen 14, S-135 41 Tyresö, 11-jara knabino deziras korespondi hungare kaj Esperante kun lernantoj el la hejmlando Hungario.

14 gelnantoj en 'Leterkurso de Esperanto', Stimmets Skola, S-135 42 Tyresö, dez. kor. tutmonde, 11—12-jaraj.

Tanzanio

Felician A. Walwa, Shimiyu Esperanto-klubo, P.O. Box 94, Magu-Mwanza, Tanzanio. La klubo okazigas kursojn por 9—20-jaruloj, kiuj deziras korespondi kaj bezonas lernilojn.

Johni Bitoro, doktoro, Box 2650 Mwanza; s-ro Edino Masuro, Box 273, Mpanda, Rurwa; s-ro Rashidi Sultan Puga, Box 2374, Mwanza, membroj de la Viktoria E-klubo dez. kor. tutmonde.

Sara Joseph, S.L.P. 51, Bunda. 16-jara, dez. kor. pri ĉ. t. kaj ricevi helpon por studadi Esperanton.

Togolando

Klubo 'Juna amikaro', p/a Agbemadon-Attigbe B. Mensah, CEG de Zalive, B.P.

134, Aneho. Dez. kor. tutmonde pri ĉ. t. klubanoj Houmey Nontondivo, Folly Assion, Zou Foli, Adade Ekoué, Zou Kangui Alfred, Togbossi Yao, Agbemadon Foli Homéfa kaj Anani Yao. Ili lernas Esperanton per *Medodo 11* kaj rektmetode — ili parolas kaj aktoras.

Zairio

Habib Bourguiba Jr. Ngangu, s/c Mme Ngoyo Semo Louise, CIZA - Lukala, tra Aginter Services, 272, Av. D'ausserghen, B-1040 Bruxelles, Belgio. dez. kor. Ŝatas lingvojn, teatron kaj muzikon. Komponas kaj kantas Esperante. Gitarludisto de *reggae*. Kaj, jes, ni volonte aperigos unu el viaj kanzonoj en nia revuo!

Korespondpetojn de junuloj kaj instruistoj ni volonte aperigas senpage.

Kiam vi sendas korespondeton, bonvolu skribi por nia en aparta alineo per klaraj preslite-roj la precizan tekston, kiun vi volas vidi en la revuo! Lasu malplenan linion antaŭ kaj post via teskto, por ke ni rapide vidu ĝin kaj povu facile enkomputiligi ĝin! Vi rajtas sendi foton, sed ne en ĉiu numero ni povas aperigi fotojn!

Se vi komencas korespondi, nepre ne eksilentu! Provu respondi akurate! Se vi ial ne plu povas korespondi, almenaŭ skribu unufoje por klarigi tion. Ne senluziligu novaĵn lernantojn per silento!

Estu fidela leter-amiko!


Kion poŝtisto povas trovi!

Unu el la plej danĝeraj profesioj estas certe tiu de poŝtisto. Ekzemploj? Unutage la kunlaborantoj de la tel-aviva ĉefpoŝtejo travivis kelkajn malplezurajn horojn, kiam ili ektrovis en unu el la sendaĵoj — tri krokodilojn! Verdire tiuj ne estis grandaj plenkreskaj krokodiloj, nur junaj krokodiletoj, tamen neniu plezuro! Des pli, ke unu tagon antaŭ tiu surprizo ili jam ricevis poŝtpaketon, ankaŭ el Suda Ameriko, el kiu rampis kelkaj serpentoj kaj ilin poste dum multaj horoj serĉis speciale invitita serpent-kaptisto. Ĉi-foje la bravaj poŝtistoj ne longe atendis kaj tuj kiam ili ekaŭdis la suspektindan bruon el la sendaĵo, ili rapide vokis helpon. Kiam oni malfermis la paketon, unue forfalis el ĝi multaj sudamerikaj ekzotikaĵoj kaj en la fino — malgranda multkolora saketo. Ĉiuj streĉe atendis. La invitita kaptisto malfermis la saketon kaj el ĝi elgrimpis du ĉarmaj krokodiletoj. La tria estis jam morta. La kompatinda besteto ne eltenis la longan aviadilan vojaĝon. Eble ĝi havis altec-timon?

Ĉiuj vivantaj rampuloj estis donacitaj al la safaria parko en Ramat-Gan. Sed la poŝtistoj ne trankviliĝas. Ĉu sekvontfoje iu ne sendos al ili elefantidon?

Eugenia Fajgenbajm.

brava: kuraĝa
suspektinda: verŝajne malbona aŭ danĝera
ekzotikaĵo: afero stranga kaj interesa,
ĉar ĝi venis el fora regiono
streĉe: kun granda intereso



La supra vera rakonto temas pri surpriza trovo. Alia vorto por trovo estas malkovro. Oni povas malkovri faktojn, ideojn, inventaĵojn, kaj forajn landojn. Esploristoj malkovras tiujn malproksimajn lokojn. La fruaj esploristoj devis per ŝipetoj vojaĝi. Tion rakontas la sekva raporto:

La historio de Nederlandoj — monda malkovrado

Dum la 16-a jarcento, Karlo la kvina, la germana imperiestro kaj reĝo de Hispanujo, regis super la Nederlandoj (pluralo!), regiono kiu etendiĝis super la nunaj ŝtatoj Nederlando, Belgio, Luksemburgo kaj la nordo de Francio.

La nederlanda vorto "neder" signifas malalta; la riveroj Rejno, Mozo kaj Skeldo fluas al la Nederlandoj kaj enfluas tie en la nordan maron. Oni nomis la Nederlandojn pro tio la Nederlandan Delton (enfluejon).

Tiu delto estas tiom grava, ke ĉiu popolo aŭ ŝtato, kiu volis regi super la kontinento Eŭropo volis konkeri tiun delton: la romianoj, la frankoj, la hispanoj, la francoj kaj la germanoj.


Jam dum la unua jarcento de nia erao la romianoj akceptis la Rejnon kiel sian nordan limon, ĉar ili volis ĉiuokaze regi super la nederlanda delto; laŭ-

longe de la rivero Rejno ili konstruis diversajn kampadejojn. La historio de la Nederlandoj estas tiumaniere la historio de diversaj popoloj kaj kulturoj.

La Nederlandanoj mem veturis al multaj landoj. Ili fondis gravajn urbojn kiel Nov-Jorko (origine Nova Amsterdamo), Kaburbo (Kaaopstadt) apud la Kabo de Bona Espero en Suda Afriko, ili malkovris diversajn marbordojn de Aŭstralio, ili donis nomojn al la najbara Nov-Zelando (la nederlanda vorto *zee* signifas maro), la maro *Tasman* inter ili kaj la nov-zelanda vulkano *Egmont*. Ili donis nomon al la maro *Barents* en norda Eŭropo (*Barents* estis fama nederlanda maristo), ili estis dum kelkaj jarcentoj preskaŭ la solaj fremduloj, kiuj komercis kun la japanoj. La historio de la Nederlandanoj estas vera monde orientita.

Dr. A. van HULZEN, Utrecht, Nederlando.

etendiĝi: kovri
 flui: iri kiel akvo
 konkeri: ataki kaj ek-regi
 erao: epoko, tempo-periodo
 fondi: starigi
 orientita: direktita



En matematiko oni plej ofte devas trovi aŭ malkovri la solvon al iu problemo. Jen interesa ekzemplo de tio:

TROVU LA AĜON KAJ TELEFON-NUMERON!

Divenu la telefon-numeron kaj aĝon de via amik(in)o. Vi povas fari tion jene: Via amik(in)o skribu, sed tiu-maniere ke vi tion ne vidu:

telefon-numeron	25.823
duobligu ĝin (x2)	51.646
aldonu 5 (+5)	5
rezulto:	51.651
multobligu 50 foje	2.582.550
aldonu la nombron da tagoj en unu jaro	365
rezulto:	2.582.915
aldonu la aĝon (ekzemple:)	20
la lasta sumo estas	2.582.935

Via amik(in)o diru nur la lastan sumon kaj vi deprenu de ĝi 615.

Jen:	2.582.935
	- 615
restas	2.582.320

La lastaj du ciferoj (20) montras kiom jaraĝa estas via amik(in)o kaj la unuaj numeroj montros lian aŭ ŝian telefon-numeron.

Prof. Jovan JANKOVIC, NIŠ.

Mi perdis la numeron!

teatraĵeto en sep scenoj por naŭ roluloj, en simpla lingvaĵo. Aktoru ĝin!

● Sceno unu: Alano ek-telefonas al sia amiko, Bruno.

Alano: Saluton Bruno! Ĉu vi scias la novaĵon? Celina ricevis telefonon! Finfine! En la pasinta semajno oni instalis ĝin. Ŝi donis al mi la numeron kaj mi skribis ĝin sur paper-peco, sed mi perdis ĝin. Ĉu ŝi telefonis al vi kaj diris al vi sian numeron?

Bruno: Ne. Al mi ŝi ne telefonis ĝis nun. Sed hieraŭ nia telefono misfunkciis dum kelkaj horoj. Vespere du telefonistoj venis kaj riparitis ĝin. Eble ŝi provis telefoni dum ĝi misfunkciis kaj povis paroli nur kun ne-konatulato.

Alano: Jes, tio regule okazas. La lineoj inter-kruciĝas.

Bruno: Kial vi ne telefonu al la inform-servo? Ili donos al vi la numeron.

Alano: Mi provis fari tion kelk-foje, sed la lineo estas ĉiam okupata.

Bruno: Kial vi ne telefonu al Dora? Ŝi estas la plej bona amikino de Celina. Verŝajne ŝi scias la numeron.

Alano: Bona ideo. Ĉu vi havas la numeron de Dora?

Bruno: Ho, verŝajne, sed kie? Momenton, mi serĉos tra mia listo de telefon-numeroj, sed ĝi estas iom malkompleta ...D,...D,...D... ne, mi ne trovas ĝin. Ĝi ne troviĝas en mia listo. Sed Ernesto certe scias, ĉar li lastatempe enamiĝis al Dora! Ĉu vi sciis tion? Telefonu al li!

Alano: Bone, lian numeron mi havas. Dankon pro la helpo! Ĝis!

● Sceno du: Alano ek-telefonas al Ernesto.

Alano: Saluton, Ernesto! Alano parolas! Ernesto! Halo! Halo! Ho, mi apenaŭ aŭdas vin! Via voĉo estas tre malklara! Ĉu estas vi, Ernesto? Ĉu vi aŭdas min? Mi krios pli laŭte! Ankaŭ vi! Ni havas tre malbonan lineon! Mi estas Alano, A-Lo-A-No-O! Se vi aŭdas min, bonvolu revoki min! Dankon! Ĝis! (*Li demetas la aŭskultilon.*)

● Sceno tri: Alano atendas, kaj post kelkaj sekundoj, la telefono sonas.

Alano: Ha, saluton, Ernesto, jen, ni ricevis pli bonan lineon!

Bruno: Sed mi ne estas Ernesto, mi estas Bruno. Mi retrovis la numeron de Dora dorse de uzita bus-bileto en la poŝo de ĉemizoj, kiun mia Panjo ĵus lavis. La inko iom disfluis, sed la numero estas preskaŭ legebla: tri-kvin-

Ĉi tiu teatraĵo komentarias la staton de telefona sistemo en iu lando. Ni volas klare kaj nemiskompreneble komprenigi al vi, ke simileco al iu ajn konkrete ekzistanta ŝtato — senkonsidere ĉu vivanta ĉu bankrotiĝanta — estas neniel hazarda, sed absolute, senrezerve kaj sen-nuance intencata. Dankon!

ses – du-kvar – nulo-ok ... aŭ eble ses. Tiu lasta cifero estas tute malklara – eble ses, eble ok.

Alano: Koran dankon! Mi notis la numeron kaj mi provos, Ĝis!

(Li remetas la aŭdilon, sed antaŭ ol li povas elekti, ĝi sonas.)

Ernesto: Saluton! Parolas Ernesto. Mi revokas laŭ via peto, jam trifoje mi provas, sed estis okupata la lineo.

Alano: Jes, intertempe Bruno telefonis al mi. Dankon pro la revoko, ĉu vi povis aŭdi min?

Ernesto: Aŭdi vin? Vi preskaŭ surdigis min! Vi kriis tiom laŭte! Mi devis teni la aŭskultilon unu metron for de mia orelo!

Alano: Ho, pardonon. Kontraste, mi apenaŭ povis aŭdi vin!

Ernesto: Kaj kion vi volas?

Alano: Mi volis ricevi la telefon-numeron de Dora, sed intertempe mi ĵus antaŭ minuto ricevis ĝin de Bruno.

Ernesto: Ha! Ĉu vi havas ŝian telefon-numeron? Mi provas dum du semajnoj ekscii ĝin – sed ŝi rifuzas doni ĝin al mi. (*Suspekteme*) Kial vi volas telefoni al ŝi? Vi ne volas inviti ŝin al kinejo aŭ promeno en la parko, ĉu?

Alano: Tute ne! Ne timu. Mi volas de ŝi nur ekscii la telefon-numeron de Celina!

Ernesto: Aha! Mi komprenas. Estas *Celina*, kun kiu vi volas promeni en la parko...!

Alano: Tute ne – sed ĉu vi hazarde havas ŝian numeron?

Ernesto: Ne. Ŝi ne interesas min, nur kun Dora mi volas paroli!

Alano: Nu, bone. Do, vi ne povas helpi min. Tiukaze ĝis reaŭdo aŭ revido!

Ernesto: Hej! Momenton! Ne finu la vokon! Donu al mi la telefon-numeron de Dora! Mi tuj notos ĝin!

Alano: Nu, se ŝi rifuzas doni ĝin ... ĉu mi morale rajtas...

Ernesto: Vi rajtos ludi per mia nova komputila lud-aparato lunde!

Alano: Bone, tio solvas la moralan dilemon. La numero estas tri-kvin-ses – du-kvar – nulo-ok! Sed atentu, unue mi volas telefoni al ŝi!

Ernesto: Bone, diru, ke tuj poste venos voko de alloga kaj ĉarma junulo!

Alano: Mi diros. Ĝis! (*li remetas la aŭskultilon.*) Ĉarma – alloga? Kiel raneto – aŭ bufo! Nu, bone, mi telefonu al Dora ... (*li elektas*) tri-kvin-ses – du-kvar – nulo-ok. (*ĝi sonoras.*) Saluton!

Maljuna sekretariino: Bonan tagon! Ĉi tie la urba kloak-malŝtopiga kaj pest-best-eksterma fako, kiel mi povas helpi vin?



Alano: Neniĉ, dankon. Pardonu, verŝajne malĝustan numeron mi elektis. (*li intencas remeti la aŭskultilon, sed subite memoras ion.*) Tamen, mi havas mesaĝon. Post momento, vi ricevos vokon de alloga kaj ĉarma junulo!

Maljuna sekretariino: Ho, ĉu vere? Kia surprizo! (*Ŝi ordigas la hararon, dum Alano remetas la aŭskultilon.*)

Alano: Dua provo: tri-kvin-ses – du-kvar – nulo-ses. (*Ĝi sonoras.*)

Panjo: Familio Bono! Bonan tagon!

Alano: Saluton, ĉu mi rajtas paroli kun Dora?

Panjo: Kiu vi estas? Ĉu Ernesto? Se jes, Dora ne estas hejme!

Alano: Ne, mi ne estas Ernesto. Mi estas Alano.

Panjo: Nu, bone. Sed, *fakte*, Dora ne estas hejme. Ŝi vizitas Franjon. Mi povos doni al vi la telefon-numeron de Franjo, se vi volas...

- **Sceno kvar:** *Alano telefonas al la ricevita numero*

Franjo: Ne, Dora ankoraŭ ne alvenis. Sed ŝi intencis viziti Georgon survoje al ni por prunti diskojn. Mi donos la numeron...

- **Sceno kvin:** *Alano telefonas al la ricevita numero*

Georgo: Ne, Dora ĵus foriris, kaj forportis miajn plej bonajn diskojn. Post kelkaj minutoj ŝi atingos Franjon. Nedankinde! Ĝis.

- **Sceno ses:** *Alano revokas al Franjo kaj Dora venas al la aparato.*

Dora: Ĉu vi certe ne estas Ernesto? Se jes, mi ne estas Dora!

Alano: Mi certe ne estas Ernesto, mi estas Alano.

Dora: Tiukaze, mi estas Dora. Sed ... vi ne mesaĝas de li, ĉu?

Alano: Tute ne. Mi scias, ke Ernesto intencis voki vin, sed elektis anstataŭe alian virinon!

Dora: Tre bone! Do, kion vi deziras?

Alano: Vi estas bona amikino de Celina.

Ĉu vi scias ŝian telefon-numeron?

Dora: Jes, ŝi donis ĝin al mi, ...se ĉu mi

donu ĝin al vi? Mi donos ĝin nur... se vi invitos min al kinejo!

Alano: Konsentite! Sabate ni kune vizitu kinejon. Donu la numeron!

- **Sceno sep:** *Alano finfine sukcesas voki al Celina*

Celina: Saluton, Alano! Parolas Celina! Mi ĝojas, ke vi vokis. Kion vi deziras?

Alano: Ho, mi nur volis gratuli vin, ĉar vi finfine sukcesis eniri la mondon de la moderna teknologio ... vi akiris telefonon! Certe via vivo ekde nun fariĝos multe pli facila kaj senkomplika! Gratulon denove! Ĝis!

smg


Verku la konversacion inter Ernesto kaj la maljuna sekretariino!

Desegni per komputoro

Eble kelkaj inter vi jam estas spertuloj sur tiu kampo, aliaj verŝajne neniam ĝis nun vidis tian aparaton aŭ laboris per ĝi. Por tiuj, kiuj ĝis nun ne scias: oni ne facile ekstraktas komputoron, se ĝi ne estas nura ludilo. Pasas multegaj horoj por lerni la diversajn kapablojn de tiu maŝino. Por komencanto eĉ povas esti problemo ekfunkciigi la aparaton kaj eniri la programon. Proverbo diras: *Per eraroj oni lernas*. Ĝi en ĉi tiu kazo fakte estas tre trafa. Nur post multaj eraroj kaj ĉagrenigoj mi ĉiam pli sukcesis eniri la sekretojn kaj kapablojn de tiu stranga kaj tamen alloga ilo.

Kiam mi aĉetis komputoron, min precipe interesis ĝia skriboprogramo, per kiu oni povas skribi leterojn aŭ artikolojn, korekti facile vortojn kaj frazojn, elekti diversajn literotipojn, grasigi kaj substreki la literojn, blokigi la skribadon, larĝigi la interlinian spacon, kontroli kaj arangi la tutan pagon ktp. Aldone al tiuj diversaj eblecoj la komputoro entenis ankaŭ limigitan desegno-programon. Per ĝi mi intertempe iom eksperimentis — ĉiam pli kun plezuro — kaj nun ŝatas komuniki al vi miajn spertojn. Nu, kiel oni povas desegni elektronike? Per ekzemploj mi volas klarigi tion. Post la premo de certaj butonoj ekfunkcias la komputoro kaj heliĝas la ekrano. Mia mano kaptas la muson, kuŝantan surtable sur tiel nomata *musopado*. *Muso* en tiu konteksto ja ne signifas vivantan muson, sed ilon, per kiu oni klavopreme donas diversajn ordonojn al la aparato aŭ, glitante per ĝi sur la pado, libere desegnas aŭ skribas. Ĉion oni vidas sur la ekrano. Tie rande simboloj montras la diversajn desegno-manierojn. Mi elektas inter divers-dikaj strekoj (1.) kaj komencas desegni liniojn. Poste mi laŭvole aldonas cirklojn kaj kubojn diverse grandajn, ene malplenajn, sed ankaŭ plenigebajn (2.) nigre aŭ per aliaj koloroj. Mi aliras la ŝprucilo-simbolon kaj per ĝi sprucas (3.) laŭ mia koncepto sur la bildon. Parton fuŝitan aŭ malplaĉan mi povas eltondi (4.) kaj tiamaniere forpreni aŭ alien loki. Same estas eble forviŝi parteton (5.) aŭ ĉion post puŝo al la skrapguma simbolo. Ankaŭ eblas neniigi nur la lastan agon.

Per granda skalo de diversaj koloroj mi povas laŭplaĉe kolorigi la bildon. Truko-klavo ebligas grandigi (6.) aŭ malgrandigi (7.), multoblige (8.), klini (9.) kaj renversi (10.) antaŭe enkadrigitan parton aŭ la tutan bildon. Estas ankaŭ eble enskribi tekstojn (11.) en la desegnaĵon aŭ enmeti bildon jam antaŭe stokitan en la komputoro (12.). Bildon, pri kiu mi estas kontenta, mi fine deponas en la aparaton per premo al speciala klavo kaj aldono de kodvorto. Tiu signal-vorto kapablas revoki la saman bildon per simpla klavopremo por daŭrigo aŭ korektado. Se plaĉas la desegnaĵo, mi laste elpresas ĝin per presilo sur paperon, ĝis nun bedaŭrinde nur nigre-blanke.



11. ankaŭ skribaĵo estas ebla, eĉ pligrandigebla

12.

Kompreneble ekzistas desegno-programoj pli vastaj, abundaj, rapidaj kaj kapablaj por specialistoj, kiuj profesie okupiĝas pri tiu temo. Ekzemple lumo-skribilo tie anstataŭas la muson, kiu por desegnado estas iom neadekvata. Speciala legilo kapablas senpere enigi en la komputoron jam pretajn tekstojn kaj bildojn, eĉ el televidaj programoj. Ĉio estas poste libere prilaborbla. Pretajn ellaboraĵojn oni surpaperigas per kolor-presmaŝino. Vi povas imagi, ke tiuj aparatoj estas tre multekostaj kaj kompensas la prezon nur dum profesia uzado.

La desegnaj eblecoj de komputoroj ja estas ravaj kaj interesaj, kvankam foje iom mekanikaj. La elektroniko povas faciligi kelkajn laborojn, sed ĝi ne povas memstare labori, ne anstataŭi talenton. Mi pensas, ke tiaj aparatoj povos nur akompani, sed ne forpuŝi la tradician arton. Uzi sur blanka papero la propran manon, simplan krajonon kaj la fantazion ĉiam restos plezure, eble pli home ol la komunikado kun maŝino: Ĉu ankaŭ vi tion iam spertos?

RÖSSLER Rita, Germanio

komputila programo: serio de ordonoj, kiuj igas komputilon liveri iun rezulton.

ĉagreniĝi: ekesti malkontenta pro iu mis-faro aŭ mis-funkciado.

blokigi: aranĝi en bloko (ne kutima signifo)

truko: artificio, lerta maniero fari ion.

klini: oblikvigi

deponi: stoki, sekure formeti

komputoro = komputilo

ROL-LUDO: Perdita ganto

Situacio: Sandra alvenas hejmen, kaj unu ganto mankas.

Sandra: Vi memoras, ke vi havis du gantojn, kiam vi forlasis la lernejojn. Rakontu al Panjo, kion vi faris dum la hejmen-veno. Vi volas ludi kun viaj amikoj.

Panjo: Vi rimarkas, ke unu ganto mankas. La gantoj estas novaj kaj multekostaj. Decidu, ĉu esti kolera aŭ ne. Demandu pri la hejmen-veno de Sandra. Decidu, kion ŝi devas fari. Donu klarajn ordonojn!

Trevoro, Ursula, Ŭebster kaj Viola estas kvar amikoj, sur la strato apud la domo de Sandra. Unu trovis la ganton kaj redonos ĝin (estu sekreto, kiu el la kvar!). La aliaj tri proponas ne plu serĉi la ganton sed foriri kaj ludi (ĉiu decidu, kiun ludon proponi!).

Konkludo: Ĉu Sandra retrovos la ganton? Ĉu ŝi foriros ludi? smg

Denove, en nia bildstrio, ne rolas Gogo mem, sed Ina kaj Kulo, du ardat esperantistoj.

En la esperanta mondo ĉiu organizaĵo -- de la plej eta vilaĝa klubo ĝis la plej grandaj mondaj asocioj -- funkcias per komitato, tio estas, grupo de elektitaj homoj, kiuj kunvenas por diskuti kaj decidi aferojn. Malofte tiuj kunsidoj estas mallongaj!

Nun, Ina kaj Kulo ege ĝojas, ĉar ili re-trovis unu la alian! Bonvenon al...

Aktoru la dialogon! Kompletigu la konversacion!

Joĉjo: Panjo, mi perdis mian

Panjo: Ho, ne denove! Kie vi laste

Joĉjo: Mi certe havis ĝin hieraŭ, kiam mi

Panjo: Kaj ĉu de post tiam vi

Joĉjo: Mi kredas, ke ne. Hodiaŭ matene mi nur

Panjo: Joĉjo, vi estas terura! Mi jam vidas ĝin! Rigardu, tie ĝi estas, malantaŭ la

Joĉjo: Ho, bonege! Ĉu mi nun rajtas

Panjo: Jes! Sed ne perdu ĝin denove!

Joĉjo: Certe ne! Hodiaŭ mi zorge

Gogo la testudo

de Martin Weichert



Arboj kaj birdoj ankaŭ ne plu ekzistas

Infanoj skribas pri sia estonteco

Eldonita germanlingve de: Margitta Meinerzhagen. Eldonejo: Rasch kaj Rohring, Hamburgo. Sendis kaj selektis tekstojn laŭ speciala permeso de la eldonejo: Nora Caragea, Frankfurto.



Eĉ la hundo forpereos

Versajne la aero estos aĉigita pro la fumo de la fabrikoj, multaj novaj estos konstruataj. Tio alportos laborejon por kelkaj, sed aliaj estos anstataŭigitaj per robotoj. Bela mondo tiam ne plu eblos.

La verda pejzaĝo kaj la vilaĝoj estos anstataŭigitaj per odoraĉantaj urboj, kaj kun sia familio oni loĝos en simpla ligno-domo. La arboj estos forigitaj, ĉar laŭdire

oni bezonas la lignon por pli bonaj aferoj. Ĉie svarmas progreso, kiu estas je nenies profito.

La homo kondutos kiel roboto. Matene ellitiĝi kaj iri al laborejo, tagmanĝi, labori, vespermanĝi, rigardi televidon kaj dormi. Tiam ĉio rekomenciĝas. La homo ne plu havos plezuron pri sia vivo kaj naskiĝos jam kiel maŝino. Se tio tiel pludaŭros pri la aĉigado de la aero ktp., eĉ la hundo forpereos.

13-jara knabo, Bad Orb, Germanio.

Nia revuo tra 1994!

En 1994 ni volas esti agemaj! Ni emos al agoj. Ni emfazos verbojn. Nia nuna numero prezentas la verbojn: perdi -N, serĉi -N, trovi -N, malkovri -N, ricevi -N, konservi -N ktp. Ĉiu sekva numero prezentos alian grupon de verboj. Ĉu vi povos verki por ni rakonteton per la sekvaj verboj:

94/2: kuri, salti, paŝi, promeni, naĝi, plonĝi, rampi, gliti, grimpi (-N).

94/3: puŝi -N, tiri -N, levi -N, ruli -N, ŝovi -N, movi -N, tuŝi -N ktp.

94/4: pensi, kredi, opinii, aserti, supozi, imagi, dubi, esperi (ke).

Ĉu vi povos trovi proverbojn, kiuj uzas tiujn verbojn? Trovu pli da verboj kun similaj signifoj kaj aldonu ilin al la grupoj!

Ne forgesu nepre sendi al ni la enketilon el la mezaj paĝoj! Ne-eŭropanoj sendu aer-poŝte, se eble! Ĉu vi sukcesos aldoni ankaŭ kontribuafon por la revuo? Sed ne prokrastu pri la sendo, ni volas jam en la posta numero 94/2 aperigi progres-raporton pri viaj opinioj. Ni promesas baldaŭ eklabori pri tiu numero – neniu alia nova libro rajtos ŝovi sian nazon por malfruigi nin!

La plenan analizon de la rezultoj – kune kun citaĵoj el viaj skribaj opinioj – povos aperi nur en numero 94/3, por ke ĉiuj respondoj havu tempon atingi nin, eĉ el la plej foraj mondpartoj!

ROL-LUDO: La trovita monujo

Situacio: Tri amikoj promenas kaj trovas monujon sur la trotuaro kun mono en ĝi, sed neniu nomkarto aŭ identigilo. La mono sufiĉas por triopa vizito al glaci-kremejo, manĝejo kaj kinejo.

Karlo: Vi opinias, ke la grupo prenu la monon kaj komune amuziĝu – eble ĝuste en kinejo, kie oni ja montras bonan filmon. La monsumo ne estas granda, ne indas raporti la aferon al la polico.

Lucinda: Vi samopinias, sed preferas kvaronigi la monon, por ke ĉiu grupano elspezu ĝin laŭvole, unuope.

Marcelo: Vi malsame opinias. Ne gravas la monsumo, necesas transdoni la monon al la polico. Eble apartenis al infano, por kiu la sumo estus granda.

Nora: Vi opinias, ke la trovintoj ne rajtas konservi ĝin, sed la sumo estas tro bagatela (sen-signifa) por la polico, kaj ili certe ne trovos la perdinton. Vi proponas meti ĝin sur barilo apud la loko, kie la grupo trovis ĝin, ĉar la posedanto eble revenos.

Konkludo: Kiu plej konvinke argumentos? Kion ili faros?

smg

Kiuj serĉas kion?

Ligu la homojn, kun la serĉaĵoj

infanoj	perfektan melodion
policistoj	ekvilibran buĝeton
esploristo	d-ron Livingstone
teksasa boristo	iluminiĝon
komercisto	ĉokoladon
poeto	kvar-folian trifolion
matematikisto	la flug-havenon
filozofo	profiton
monaĥo	krimulojn
kamelo dezerte	blankan kuniklon
optimisto	oleon
taksiisto	inspiron
piloto	nekonatajn landojn
muzikisto	akvon
magiisto	la solvon
Stanley	la malrektan vojon
registaro	la veron

بهار

Printempo

Danco de printempa novedzin'
La ĝoj' de platan' kaj de poplo
Bruo de akvofal'
Murmuro de roĵo
Kaj kantoj sur branĉar'
Estas preĝo al vi
Ho, printempo mia
Ho, printempo mia!

سید میر باغیان

Morteza Mirbaghian.
Irano/Hungario.

Se vi ĝuis la serĉadon kaj trovadon en ĉi tiu numero – kiu estas parto de nia nova stilo, kaj kiun ni plie modifos laŭ viaj respondoj al nia enketilo, trovu por ni pli da legantoj kaj abonantoj! Anticipe, ni dankas vin!